

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

Por Zamenhof-Festo, vidu p.2, 3!

Niaj Klasoj kaj Kursoj

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; de junio oni lernas per kroata rakonto "Mirindaj Aventuroj de Metilernanto Hlapiĉ". / (2) Klaso por legado de "Hispana, Kataluna, Mangada..." gvidata de Doi Hirokaz. / (3) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: ĝis decembro, "Vojaĝo en Esperanto-Lando", kaj de januaro, "Vizaĝoj". / (4) Daŭriga kurso, gvidata de Fuse Kentarou.

*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni legas "Kie boacoj vagadas" de Eija Salovaara. / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de "Hanako lernas Esperanton".

TIEL OKAZIS

Hama-Ronda Vespero pri Jui Ĉuunoŝin

*la 15a de novembro, 17h00-19h00, ĉambro 710 de la regula kunsidejo

S-ro Jui, unu el la iniciatintoj de nia rondo, forbruligs sin en 1967 proteste alla tiama japana ĉefministro Satoo Eisaku apoganta usonan agreson al Vjetnamio. Pri lia ago kaj la historia fono parolis s-ino Aihara Misako, unu el la tiamaĵ rondo-iniciatintoj (nun loĝanta en Ĉiba), kaj s-ro Doi Hirokaz, alia iniciatinto kaj daŭra loĝanto en Jokohamo, resumis la sintenon de siatempaj kaj postaj rondanoj. Opinion levis ankaŭ Huse Kentarou, studento en la momento de sinbruligo, sed ne ankoraŭ esperantisto.

Vizito al la tombo de Jui

*la 23a de novembro posttagmeze, en la tombejo Kamakura-Reien

11 homoj (inkluzive de 1 neesperantisto) vizitis la tombon de li kaj lia familio. Ĝi estis fondita de Jui Ideo, lia unua filo, kiu jam forlasis la mondon. Tiu nomo "Ideo" estas Esperanto-devena.

NIAJ PLANOJ

Zamenhof-Festo en Kanagaŭa 2014

*la 14a de decembro, 13h00-16h30, en la Tikyuu Simin Kanagawa Plaza (etaĝo 5)

Pri deklamado de Eroŝenko-aĵoj, vidu en alia paĝo!

Jarfina Festeno

*la 20a de decembro, 18h00-20h22, en ĉina restoracio Hukuyooken

Ĝenerala jarkunveno de Jokohama Esperanto-Rondo

*la 25a de januaro 2015, 13h00-17h00, en Tikyuu Simin Kanagawa Plaza (granda kunsido-ĉambro)

Hama-Ronda Vespero

*la 21a de februaro 2015, 17h00-19h00, en ĉambro 709 de la regula kunsidejo

*Temos pri la 100-a Universala Kongreso en Lillo, Francio.

■ Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti, Noriko
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
 ■ Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

Eroŝenko deklamota!

--- okaze de la Zamenhof-Festo en Kanagaŭa 2014 ---

Sibayama Zyun'iti por la Projekto Eroŝenko 125-jara

Antaŭparolo: En la Zamenhof-Festo (la 14-an de decembro, en Jokohamo), ni havos programeron pri Eroŝenko. Tiam ni rakontos la vivon de Vasilij Eroŝenko (1890-1952), kaj dume ni aŭskultos deklamon de liaj verkoj, laŭ lia vivotempo. Jen estas la fragmentoj deklamotaj. Krome estos deklamo de liaj originale japanlingvaj verkoj.

(1) El liaj knabaj tagoj en Ruslando.

La verko mem estis verkita kiam li, ekzilita de Japanio, restis en Ĉinio.

El “Unu paĝeto en mia lerneja vivo”, 1923

(prenita el “Lumo kaj ombro”, p.5-6)

Mi estis blinda, mi blindiĝis kiam mi estis kvar-aĝa. Kun larmoj kaj plendoj mi forlasis la regnon de l' belaj koloroj de l' brila sunlumo. Ĉu tio ĉi estis por bono aŭ malbono, mi ankoraŭ ne scias. La nokto daŭras longe kaj daŭros dum mi spiras. Sed, ĉu mi malbenas ĝin? Ne, certe ne. [...]

Kiam mi estis naŭ-jara, oni sendis min al Moskvo por lerni ion en la blindullernejo. La lernejo estis fermita de la tuta mondo, la lernantoj estis permesitaj nek eliri ĝin por siaj aferoj nek iri eĉ la gepatran hejmon dum libertempo. Ni ĉiam estis sub la kontrolo de instruistoj. La instruistoj instruis al ni ke la tuta tero estas granda kaj multaj homoj ankoraŭ povas trovi lokon por vivi sur ĝi. Nia amiko Lapin, la knabo dekunu-jara, demandis: “Se la tero estas granda, kial do mia patro neniel povas havigi al si eĉ malgrandan pecon da ĝi por kulturi kaj ĉiam devas lui ĝin de la Grafo Orlof?” La instruisto punis lin pro la malsaĝa demando; en nia klaso ni povis demandi al nia instruisto nur saĝajn demandojn. [...]

(2) El liaj unuaj jaroj en Japanio

Li venis en Japanio, kaj lernis la japanan lingvon. Jena verko en 1916 estas unu el liaj fruaj japanlingvaj verkoj, aperintaj en brajla gazeto, kaj nur lastatempe retrovita. Ĝia esperanta versio estos unuafoje voĉlegata.

El “Pasko”

Originalo 復活祭の日,
tradukita de SIBAYAMA Zyun'iti

Iam en paskotago, mi kun miaj fratoj kaj

amikoj, iris ludi en pinarbaron. Tiam, Nina alparolis min, premante mian manon; “Oni diras, ke vizaĝo de blinda homo estas malbela, sed mi ne pensas tiel. Ĉi-matene, vi kisis min je pasko, kaj tiam mi bone rigardis vian vizaĝon. Kaj mi rimarkis je eraro de la onidiro.” Kaj Nina ridis agrable. Sed nun, eĉ tiu epizodo estas unu el la fabeloj de la Avinjo Maria.

La Avinjo vivadis en malgranda kota kabano de la naskiĝo ĝis la morto. Malgraŭ tio, ŝi rakontis pri la bela granda palaco el blanka marmoro. Ŝi estis por ĉiam malriĉa kaj pasigis malfeliĉan vivon, sed en malvarmaj vintraj tagoj, ŝi sidis kun ni infanoj apud varma hejtilo kaj rakontis pri la feliĉo de la reĝaj familianoj.

Siatempe mi miris, kial ŝi scipovas pri tiaj pompaj aferoj. Eĉ nun mi miras je tio. Ŝi vidis en sonĝo la grandan palacon el blanka marmoro, la feliĉon de la reĝaj familianoj. Ja homoj oftege havas sonĝon ...

(3) El liaj postaj jaroj en Japanio

Li verkis fabelojn japanlingve, sed ofte kun satiro al la socio. Li estis ekzilita el Japanio kiel homo “danĝera” en 1921, kaj la verko estas tia satirplenaĵo.

El “Morto de la kanario”

Originalo カナリヤの死,
tradukita de SIBAYAMA Noriko

Iu sinjorino, ĉasanto de novmodo, ĝuis bredi kanariojn.

Ŝi intencis naskigi multajn ovojn al maljuna kanariino en tiu ĉi printempo, por tio ŝi aĉetis ankoraŭ unu junan virkanarion, ĉar ŝi pensis, ke nur unu viro ne sufiĉos. Tamen la tri kanarioj kvereladis dum tuta tago en la kaĝo flankenlasante sian devon naski ovojn.

Pro tio maltrankvile ŝi multfoje enrigardis la kaĝon kaj diris.

“Ba, kio okazis al miaj kanarioj? Harmoniiĝu baldaŭ kaj demetu ovojn, mi deziras. Ili tamen ĉiam kverelas. La ina kanariaĉo eventuale klopodas kontraŭkoncipi kvazaŭ subtenantino de politika rajto de virinoj, kiu malestimas virojn. Tia kontraŭkoncipo sen konsilo de kuracisto estas danĝera.”

Sed kanarioj estis tute indiferentaj pri tio.

(4) El liaj jaroj en Ĉinio

Li vivis en Ĉinio de 1921 ĝis 1923, konatiĝis kun Lusin, ekverkis en Esperanto. Jena rakonto estas lia originalaĵo.

El “Rakontoj de Velkinta Folio — Malgrandaj Fabelaj Skizoj de Ŝanhaja Vivo —”, 1923

(prenita el “Lumo kaj ombro”, p.53-54)

I. La strata arbo

En la stratoj de tiu ĉi urbo mi konas unu grandan arbon, nun ĝi staras silente, nun ĝi diras nenion, nenion ĝi volas nun diri; kaj mi ne scias kiom da jaroj ĝi vivis, kian aĝon ĝi havas, sed scias mi vere ke tiu ĉi arbo vidis honoron de la imperiestroj de tiu ĉi lando, vidis ankaŭ ilian malhonoron kaj falon. Ĝi vidis la popolon de tiu ĉi lando rabitan de samlandaj altrangaj rabistoj, ĝi vidis la popolon rabitan de fremdaj malaltrangaj rabistoj, kaj ploris ĝi tiam kaj petis la venton: “Ho, vento, faligu min tuj por ke nenion mi vidu!” Sed la vento respektis la arbon, ĉar ĝi estis tiel antikva. Kaj nun la arbo vidas la popolon rabatan de samlandaj, same kiel de fremdaj rabistoj, de flavaj kaj blankaj rabistoj, sed nun ĝi jam diras nenion, nenion ĝi volas nun diri, pro kio mi tute ne scias. [...]

(5) El liaj jaroj en Siberio en Ruslando

Reveninte en Rusion, li loĝis diversloke. En 1929 kaj 1930, li estis en la plej nordorienta parto, nome la Ĉukotka Duoninsulo.

El “Ĉukĉa idilio – Rakonto de ĉukĉo –

(prenita el “La tundro ĝemas”, p5-p7)



Sub la suno dormas granda maro; ĉe la maro dormas mi malgranda... La granda maro sonĝas; — kaj ĝian sonĝon sonĝas ankaŭ mi.

La maro sonĝas: ĉukĉa boato **bajdaro** flosas sur la maro, sen veloj, sen remiloj, sen ia



direktilo. En la bajdaro sidas homo. Li fumas pipon kaj ridetas. Ne plaĉas al la maro — sen veloj, sen remiloj, sen ia direktilo, kaj la homoj ridetas...

Ekplaŭdis ĝi per ondo kolera. La homo fumas kaj ridetas — ekmontas li per fingro dekstren, — bajdaro lia flosas dekstren; ekmontas li maldekstren, — maldekstren turniĝas ĝi, sen veloj, sen remiloj, sen la direktilo.

La maro ekkoleris; ĝi sendas ondon post ondo, ondegon post ondeg. La homo fumas pipon kaj ridetas; bajdaro lia flosas pluen.

La maro sendas nun glacian monton. Premiĝas la bajdaro al la monto kaj kune ili flosas pluen, maldekstren, se maldekstren montras fingro estra, kaj dekstren, se ĝi montras dekstren.

Ektremis, ekboleis nun la maro, kaj jen aperas granda **rosmaro**. Buŝego ĝia estas malfermita, dentegoj estas pretaj disŝiri la bajdaron. La homo nur ridetas. Ekkraĉas li fumeton el la pipo kaj la rosmaro iras funden.

La maro nun ekfuriozis kaj el profundaj akvoj aperas balenego. Eksvingas ĝi teruran vostegon, tuj subakviĝas la bajdaro...

Surfunde kuŝas la bajdaro, sed ĝia estro, kie estas li?

Ne estas li surfunde, ne estas sur la akvo — nur dormas mi ĉe l' maro.

La maro ekspiris kaj vekigis; vekigis ankaŭ mi kaj ekĝemis: bajdaro mia ne vidiĝas plu ĉe l' bordo, libere flosas ĝi en la libera malproksimo kun veloj, kun remiloj, kun bona direktilo, nur mankas mi, la mastro. [...]



La tri bildoj estas el Vikipedio.

VASILIJ EROŜENKO – JAPANA POETO (2)

Tatyana Auderskaya (Ukrainio), verkita en 2012

En 1916 Vasilij Eroŝenko forveturas al Tajlando, por fondi tie lernejon por blinduloj. Sed en tiu tempo la lando kondukis la **politikon de fermiteco**^{(*)1}, de limigo de eksterlandaj aktivecoj, kaj li ĉiam renkontis pasivan, sed nerefuteblan oponon de ŝtataj oficistoj. Sed li ne estas el tiuj homoj, kiuj cedas antaŭ malfacilaĵoj. La homamo gvidas lin; kaj li, eklerninte la tajan lingvon, fondas en ĝangaloj popol-lernejon por blinduloj. Legendo diras, ke dankemaj tajoj starigis monumenton al Vasilij Eroŝenko en Siam (tiam nomo por Tajlando). Iu verkisto diris: “Tute ne gravas, ĉu vere ekzistas monumento de Eroŝenko en Siam. Eĉ se ĝi ne ekzistas, tutegale la monumento staras. Ĝi staras en animoj de multaj homoj. Kaj staras ĝi jam poreterne, ĉar legendoj estas faritaj el materialo pli firma, ol bronzo, granito aŭ marmoro”.

En 1917 Eroŝenko transveturas al Birmo kaj eklaboras kiel direktoro de la porblindula lernejo en Moulmejn. Al la antaŭaj 20 lernantoj de tiu lernejo li aldonis ankoraŭ 100 novajn, mem serĉante ilin tra la lando. Li tute aliigis la programon de lernado, proponante al infanoj ĉiuf flankan disvolviĝon kaj konatiĝon kun la propra lando. La blinda Eroŝenko vojaĝis kun siaj blindaj lernantoj tra tiu mirakla lando, lando de muziko kaj floroj, de noktaj torĉprocesioj “cve”, palmoj kaj miloj da pagodoj; lando de vivoĝojaj kamparanoj kaj senzorgaj monaĥoj.

Li notas birmajn popolfabelojn kaj budhismajn legendojn en monaĥejoj. Pri ili li diris: “Tio estas neelĉerpebla materialo. Antaŭ mi malfermiĝis nova mondo – riĉega simbolaro, plena de profundaj misteroj. Eĉ se mi loĝus la tutan vivon en tiu lando, mi tutegale ne sukcesus ĝisfunde ekkoni ilian enhavon”.

Tamen, en Rusio okazas revolucio, kaj Eroŝenko volas reveni al la patrujo, “por partopreni la politikan vivon de Rusio”, kiel li skribis al sia amiko **Torii Tokiĝiroo**^{(*)2}. Eroŝenko venas al Hindio, kie rezidis tiam la rusa konsulo; sed britaj koloniaj potencoj enprizonigas lin per “**hejma aresto**”^{(*)3}, sub preteksto, ke li estas “germana spiono”. Sed ankaŭ tie Eroŝenko ne elspezas la tempon vane. Li notas japanlingve hindiajn popolfabelojn kaj publikigas ilin en japana junulara revuo “**Syonen kurabu**”^{(*)4}. Kaj poste, fuĝinte el-

sub “hejma aresto”, li sola vojaĝas tra Hindio, plonĝas por serĉi perlojn kune kun grupo de perlotrovantoj, interesiĝas pri la vivo de blinduloj en Hindio. Ja en tiu lando ilia vivo estas aparte terura, ĉar ankaŭ blinduloj tie estas dividitaj je kastoj, kaj ilia tradicia metio de broso- kaj korb-farantoj destinas al ili senelire malfeliĉan vivon, ĉar tiuj kastoj apartenas al la plej malestimataj en Hindio...

Sed kion li povis fari kontraŭ miljara tradicio, kiu eĉ nun, post 100 jaroj, kripligas la vivojn de hindoj?

La vivo en Hindio, sub peza brita atento, estas sufoke malfacila por Vasilij Eroŝenko. Al Soveta Rusio oni ne enlasas lin; al Japanio oni ne akceptas. Kaj tiam li decidis mem alproksimigi sian forveturon. En **Kalkutta (nuna Kolkato)**^{(*)5} kinejo li petas permeson muziki antaŭ la komenco de la filmo, sed efektive li plenumas la himnon de laboristaro “**Internacio**”^{(*)6}, tradukinte ĝin al bengala lingvo. La aŭditorio eksplodas per krioj. Rekte el kineja halo Eroŝenkon forkondukas policianoj. Tiun danĝeran ribelulon oni devas nepre ekzili! Tamen, ne al Soveta Rusio, kiun Britio tiam ne agnoskis, sed al la antaŭnelonge forlasita Japanio: li devas reveni per la sama vojo, per kiu li venis! Sur la brita militŝipo Vasilij Eroŝenko estas sendita al Japanio. Sed jam dum la unua albordiĝo de la ŝipo en Singapuro, sur ferdekon venas ĵurnalistoj, el esperantaj kaj japanaj fontoj eksciintaj pri la afero. Unu el korespondantoj-esperantistoj kaŝe transdonas al Eroŝenko pakaĵon kun vestaĵo de **kulio**^{(*)7}, **harplektaĵo**^{(*)8} kaj flava farbo por haŭto. Kaj dum la sekva albordiĝo, la blindulo malaperis. Li dissolviĝis en la aro da ŝarĝistoj-kulioj, kaj eĉ sukcesis kunporti sian gitaron.

(daŭrigota)

(*)1 鎖国的な政策

(*)2 鳥居篤治郎 (1894-1970). En 1915, li, blinda, lernis Esperanton de Eroŝenko.

(*)3 自宅軟禁

(*)4 「少年倶楽部」

(*)5 カルカッタ、現在のコルカタ

(*)6 インターナショナル (の歌)

(*)7 荷役夫 (クーリー)

(*)8 弁髪